

TEA-BULTENO

17^A JARO

JULIO - AŬGUSTO 2014

NUMEROJ 7-8

Scienculo en sia laboratorio estas ne nur teknikisto,
sed ankaŭ infano staranta antaŭ naturfenomenoj, kiuj lin fascinas kiel feinrakonto.
Marie Curie (1867-1934)

Karaj Gelegantoj!

Jam somero alvenis kaj plej verŝajne la TEA-Bulteno atingos vin en via feriejo ĉemara aŭ surmonta, enlanda aŭ eksterlanda. Kiel ajn tutunue mi bondeziras ĝojan libertempadon!

Antaŭ la preparado de ĉi informilo mi jam feriiis, tiel eluzante ĉiun mian 'forpermeson', el kio sekvas ke dum ĉi somero mi suferos la ardan varmon en Triesto. Kompense, dum mia preskaŭ dusemajna foresto, pluvo kaj malvarmeto akompanis min. Tamen tio tute ne malagrabiligis aŭ ĝenis mian viziton de SKOTLANDO. Jes, tie mi estis. Malgraŭ ke mi estis vidinta nur etan parton de ĝi, tamen mi opinias prava la aserton, ke oni ĝin devus kromnomi "Verdlando". Alloge fakte surprizis min la brila verdo de ĝiaj ebenaĵoj, montetoj kaj parkoj.

Al Skotlando ni iris kvinope por partopreno en la seminario de la Grundtvig-projekto, tie okazanta enkadre de la 109^a Skota kaj 1^a Tutkelta E-Kongresoj en la verdegua urbeto Pitlochry. Mia gvidlibro preskaŭ ne menciis ĝin, enhavis nur kelkajn vortojn, i.a. taksante ĝin ne aparte interesa. Male, ĝi fascinis nin ĉiujn pro sia eleganta simpleco, kun malmultetaĝaj domoj, ĉiu havanta propran ĝardeneton kie abundis plej variaj buntaj floroj, inter kiuj rimarkindis la papavoj grandaj kiel piedplikoj (ho, spuro de la futbala mondĉampionado), fascinaj vilaoj similaj al kasteletoj kaj preĝejetoj ĉirkaŭitaj de tombejoj inspirantaj silentan meditadon.

Sed mi eku de la komenco! Ni alvenis aviadile en la skota ĉefurbo Edinburgo, kie ni planis resti tri tagojn (*tro malmultajn!*). Posttagmezis, la suno estis ankoraŭ alta en la ĉielo;

ĝiaj radioj briligis la suprajn partojn de la konstruaĵoj, transdonante efektojn magiajn al rigardo de ĵus alveninta turisto. Iom konfuzitaj, ni rigardis al la ĉirkaŭo kaj tuj ricevis senton agrablan de absolute sincera bonveniga akceptemo.

Vigla, vivoplena, moviĝema, sed ne ĥaosa (kvankam ĥaoson ni mem faris pro la nekutimo je maldekstraflanka ŝoforado), pura, amikiĝema: jen la plej trafaj adjektivoj por prezenti Edinburgon. Ĝia precipa karakterizo estas tiu preciza disdivido inter la diversaj kvartaloj, diversaj pro historio kaj arkitekturo, kiuj en la temposinsekvo alflankiĝis por kontentigi la loĝbezonojn de la urbanoj kaj de la loka elitaro aŭ reprezentantaro, havantaj sendube iun konstantan rilatponton en la surroka kastelo, ne nur geografian sed ĉefe simbolan. La kastelo dominas eĉ de malproksime la urbon, urbon sen nubskrapuloj kiuj interrompas kaj malbeligus ĝian harmonian silueton sur la horizonto. La konstruaĵoj en la malnova parto de Edinburgo - domoj, preĝejoj, monumentoj ... - plejparte starigitaj ekde la 16a jc, estas grizaj, malhelbrunaj, sed tio tute ne transdonas malgajajn aŭ subpremajn sentojn: oni flaras odoron je antikvo, je malnovo, perceptas etoson alitempan, tiom ke de unu momento al alia oni atendas el tiuj *closes* (kaŝitaj vojetoj perpendikularaj al ĉefaj stratoj) subitan eliron de fantomo, kun kilto kompreneble!

Kio surprizis min estas la belegaj internoj de la preĝejoj, riĉaj je statuoj, pentraĵoj kaj ornamaĵoj, prilumitaj de la ĉielarkaj koloroj de admirindaj vitraloj prezentantaj bibliajn scenojn.

Ĉio estas tre bone prizorgita,

preĝejo kiu ne plu havas sian funkcion, ne estas forlasita ĝis detruigo, sed ree uzita kiel muzeo, koncertejo aŭ ekspoziciejo. Do, tio signifas ke oni gardas fiere siajn havaĵojn kaj klopodas ilin plivalorigi je servado de la popolo.

Tie kaj ĉi tie, survoje, oni malkovras malgrandajn juveletojn, memoraĵojn el la pasinteco, belegajn statuojn prezentantajn skotajn grandulojn, ĉe kies bazo fojfoje staras sakŝalmisto, en sia skota kostumo, ravanta la pasantojn per entuziasmiga muziko. Post Edinburgo, al Pitlochry por labori, ĉeesti la kongreson sed ankaŭ por ekskursi kune kun aliaj ĉ. 60 partoprenantoj el 14 landoj. Unu el la programitaj vizitoj estis la Kastelo *Blair*, je kelkkilometra distanco de Pitlochry. Ĝi estas la rezidejo de la Duko Atholl, kiuj famas i.a. ĉar apartenantaj al la ununura familio havanta propran privatan armeon. La kastelo, tute blanka, havas kiel fonon verdajn herbejojn kaj montetojn, kio reliefigas ĝian rafinitan elegantecon. La kastelo estis konstruita en la 13^a jc sed pligrandigita kaj restaŭrita ĝis la 19^a jc. Mirindaj estas la 30 viziteblaj ĉambroj, kiuj rakontas per siaj originaj meblaro kaj akcesoraĵoj, kiaj portretoj de la diversaj loĝantoj de la kastelo aŭ kolektaĵoj kaj aliaj antikvaĵoj, pri la pli ol 700-jara historio de tiu juvelo situanta en strategia pozicio centre de *Highlands*.

En Pitlochry tre impresa estas la ĉirkaŭanta pejzaĝo: ŝajnas tie ekzisti la rolantoj de feina rakonto! Tial ekestis la revo mergiĝi komplete en tiun naturon kaj tiu deziro estis tuj kontentigita de la viglega skoto David, kiu proponis al marŝemuloj montan surgrimpadon! Kia bela ideo! Eĉ

sunetis dum tiu ekskursita tago, kio tute malnormalas en Skotlando! Ni ekiris sekvanse nian rapid-iran gvidanton. Post ĉirkaŭ duonhora paŝado sur arbara pado kaj atingo de submonta erikejo, la ĉielo ekploris, unue ĝentile kaj milde, poste iom pli verve kaj intense. Al demando de nia akompananto "Ĉu vi volas rezigni pri marŝado?" nee respondis unuvoĉe la paŝantoj, kiuj eĉ plirapidigis sian marŝritmon. Malgraŭ la senĉesa pluvo oni entuziasme plu sekvis la surmontan vojeton, ĉar la ĉirkaŭa spektaklo natura antaŭanoncis mirindajn vidaĵojn. *Ben Vrackie* estas la nomo de la 841-metra monteto kies pinton oni devis konkeri. Ĉe pado apudanta lageton komenciĝis la grimado laŭ ŝtupoj granitaj, el blank-griza koloro. Spiregante, de tempo al tempo oni haltis, kaj por ripozi kaj por esplori la foron kiu prezentis neforgeseblan panoramon el verdaj montetoj, griza ĉielo kun nuboj senhalte postkurantaj unu la alian kaj imponaj rokoj. Pli kaj pli la akvo trempadis niajn vestaĵojn, sed al neniu trakuris la kapon penso pri rezigno. Ju pli ni alproksimiĝadis al la pinto, des pli malvarmaj blovoj de vento komencis nin vipi. "Ne gravas!" jam videblas la supro, kie kelkaj esperantistoj jam staris kaj instigis la malfruiĝantojn per kuraĝigaj vortoj. Jen, ni alvenis. Per frostigita mano mi tuŝis la surpintan ŝtonon kaj hurais kun la aliaj bravuloj. Tiam eĉ ekhajlis, sekve ni devis tuj malsupreniri.

Fieraj kaj kontentaj, gaje interparolante (kiam eblis!), ni preskaŭ kuregis por kiel eble plej rapide atingi la bierejon, de kie startis nia ekskurso. Dum la malsupra irado oni daŭre, tamen atentante pri la glitiga tereno, ĵetadis rigardon al la ĉirkaŭaĵo, por plifirmigi la memoron pri tiuj belegaj lokoj. En la bierejo nia David regalis nin ĉiujn per bongustega, magia pocio el viskio, mielo, citrono kaj varma akvo: mi diris "magia", ĉar mi certas ke ĝuste danke al ĝi ni ĉiuj evitis malvarmumiĝon!

Kion diri pri la kongreso? Bonega!!! Certe estis kelkaj mankoj, aŭ - pli bone - stumbletoj, sed tio tute ne ŝanĝas mian opinion. Interesaj prelegtemoj, bravaj prelegantoj. La vesperoj estis eminentaj, speciale la lasta, kiam vira triopo muzikis, kantis kaj dancigis per la notoj de tradicia skota muziko. Preskaŭ ĉiuj virinoj deziris provi la paŝojn de tipa danco, precipe kiam la invitinto estis skoto, surhaviganta sian tradician kostumon! Menciindas inter la pozitivaj kvalitoj kongresaj la simpatio, gajeco kaj verve de la skotoj: se vi ne kredas min, spertu mem en iu venonta Skota Kongreso.

Post Pitlochry, la triesta grupeto iris al Inverness, bela urbeto sur la bordo de rivero Ness, kun nombraj preĝejoj, plejparte el novgotika stilo, belaj palacoj kaj - kompreneble - impona kastelo, en la Viktoria stilo, nuntempe sidejo de la Justic-Palaco. De Inverness ekas multaj ekskursoj al la ĉirkaŭaĵoj, tial kun espero je sunvetera tago ni unue per buso esploris la nordokcidentan bordon de la lago Ness, inkluzive de la ruinoj de la tre vizitata kastelo *Urquart*, kiu - konstruita en la 14^a jc - estis detruita fine de la 17^a kaj neniam plu restarigita. De tie la panoramo al la lago estas mirinda. Per ŝipeto ni reiris al Inverness: dum tiu unu horo duono de navigado ni revis pri renkontiĝo kun la mondfama Nessie, sed vane, bedaŭrinde. Ni devis kontentiĝi pri spektado de fotoj kaj filmoj en la Ekspozicia Centro pri la Ness-monstro, kie oni rakontis ankaŭ la historion pri ĝia serĉado ekde la 1960^{aj} ĝis la 1990^{aj} jaroj. Malgraŭ ĉi seniluziigo kaj la ofta pluvado, mi povas certigi, ke la tutan restadon en tiu mirinda verda lando ni ege ĝuis: nin ravis la naturaj sugestoplenaj pejzaĝoj, la arkitekturaj juveloj de la ĉefurbo Edinburgo, la ĉarmaj dometoj de la urbeto Pitlochry kaj ĉio ajn vidita kaj spertita. Indegis vizito al la historiicia Skotlando!

Via redaktanto



Projekto Grundtvig

Elloke tutmonde: la novaj defioj de volontulaĵo

La tria trejnseminario okazis en Pitlochry (Britio, Skotlando) de la 7^a ĝis la 9^a de junio.

Parto de la kunveno, en kiu partoprenis la partneroj el Francio, Italio, Litovio kaj Skotlando, estis dediĉita al komuna diskutado kaj pretigado de la raporto, kiun ĉiuj devis prezenti antaŭ la fino de la junia monato al siaj Naciaj Agentejoj.


La aliaj pritraktitaj temoj rilatis al:

- 1) Subvencioj por neregistaraj volontulaj organizoj. Estis skize prezentitaj la ĉefaj novaj eŭropaj programkadroj por poste pli detale ekzameni la subkadrojn pli alireblajn kaj taŭgajn por la engaĝitaj organizoj (ĉefe asocioj aktivaj je loka nivelo).
- 2) Projekta elpensado kaj verkado. Dum tiu ĉi sesio la gvidantoj, Francesco Maurelli kaj Maria Rosaria Spanò, danke al siaj spertoj pri EU-projektumado kaj projektmastrumado, donis gvidliniojn por verki klaran kaj koheran projektproponon kun aparta atento al la strukturigado de la enhavo de subvencipeto. Ekzemplodone oni analizis praktike la formularojn uzatajn ene

de la nunaj programkadroj, pli precize Erasmus+ KA1 kaj KA2. Krome la partneroj havis ĉiokaze la ŝancon ekplani la strategian pluevoluigon de sia organizo per elpensado de novaj moviĝprojektoj pri la programkadro Erasmus+ kaj plie pensi pri ebleco daŭrigi la kunagadon post la fino de ĉi projekto per engaĝiĝo en aliaj partneraj projektoj.

- 3) Financa mastrumado de neregistaraj volontulaj organizoj. Tiu ĉi parto de la seminario celis doni al la partneroj kelkajn bazajn elementojn kaj teknikojn por sukcese mastrumi la financojn de propra asocio.

Entute temis pri tre interesaj argumentoj, kiujn la ĉeestintoj sekvis atente. La fakto ke ĉi seminario okazis enkadre de la 1^a Tutkelta kaj 109^a Skota Kongresoj de Esperanto estis kroma ebleco de pliklerigo por la partneraj organizoj. Krome inter la celoj de Grundtvig-projekto estas ankaŭ la moviĝo de homoj de unu lando al alia, por ke ekestu vera interŝanĝo de kulturoj, per konatiĝo kun lokaj teritorioj, tradicioj kaj kutimoj, kio - kiel bone scias ĉiu esperantisto - estas esenca vivvaloro por ĉiu homo. La venontaj trejnseminarioj okazos en: Visaginas, Litovio, fine de aŭgusto; Bjalistoko, Pollando, je la unua duono de decembro; Vercelli/Torino, Italio, en aprilo venontjara.



Daŭras la aperigo de la rakontoj el la slovena libro "Butalci" de Fran Miličinski, tradukitaj de Janez Zadavec. Jen alia satira prezento pri la vilaĝanoj el Butale.

KIEL FALSA KREDO EN BUTALE FIASKIS

En Butale hejmiĝis falsa kredo, kaj en paroĥejo novaj predikisto kaj lia sakristiano fanfaronis. Ankoraŭ longjare ili du tie fanfaronus, se la lakta kremo de butalaj bovinoj ne estus tiel grasa kaj senhonte dolĉa. Nome, la predikisto ĝin alte taksis kaj zorgis, ke ĝi neniam manku.

Tamen iutage ŝajnis al li, ke iu helpas leki ĝin. Tio ne plaĉis al li kaj tial li kaŝis kremon malantaŭ la altaro. Fakte la sakristiano ŝategis kremon kaj kolero kiam la predikisto ĝin kaŝis. Lin eĉ pli turmentis la ebleco, ke probable la predikisto divenis, ke estas li la lekanto de kremo.

Baldaŭ tamen la sakristiano malkovris kremon malantaŭ la altaro, kaj jen li trovis ankaŭ la solvon por si kaj punon por la predikisto.

Dumnokte li ŝtelis kremon kaj en la preĝejo proksimiĝis al la statuo de sankta Antono. Malnova kaj vermoplenta ĝi estis. La sakristiano honeste per kulero disdividis la kremon – unu kulero por si kaj alia por sankta Antono. Baldaŭ sankta Antono havis kremon ne nur ĉirkaŭ la buŝo sed eĉ plenan je ĝi barbon kaj laŭlonge sian vestaĵon. Je la fino sakristiano metis gutojn ankaŭ sur la plankon ekde la sankta Antono ĝis malantaŭ la altaro, kie li remetis la malplanan ujon.

Matene, kiam la predikisto alvenis por panon dolĉigi per la kremo, li preskaŭ teren falis, ĉar la ujo estis malplena. Vokis li la sakristianon kaj senvorte montris la malplanan ujon. Sed la sakristiano ŝajnis sin ofendita, kaj montris gutetojn sur la planko. Sekvis ili ambaŭ la gutetojn kaj alvenis ĝis sankta Antono – kaj jen li plena je kremo! La predikisto larĝokule rigardis sanktan Antonon kaj poste la sakristianon, kaj tiu nur momente senvole ekridetis. Tio sufiĉis por ke la predikisto kolerega levu la

manojn por tuj puni la sakristianon. Sed tiu ĉi rapide kliniĝis kaj la puno trafis sanktan Antonon! Malnova kaj vermoplenta ĝi disfalis preskaŭ en polvon.

Nun ili ambaŭ ektimigis, ĉar morgaŭ pro la festotago alvenos la pilgrimantoj de malproksimaj lokoj. Tuj estis forgesitaj kaj la kremo kaj la kolero, kaj kune ili ambaŭ ĝemis pro granda embaraso.

Bonŝance la sakristiano memoris pri la ŝuisto Gaŝper, kiu estis same malalta kiel sankta Antono kaj havis eĉ similan barbon. Ili ambaŭ petis la ŝuiston, ke morgaŭ li, anstataŭ la sanktulo, staru ĉe la altaro.

Estiĝis la festotago kaj alvenis la pilgrimantoj. La ŝuisto Gaŝper staris ĉe la altaro kun kapuĉo trans la harplena vizaĝo, kun negliĝo bruna surkape, kun nudaj gamboj en sandaloj. Tute senmove li staris, kaj la pilgrimantoj klinsalutis lin kaj laŭkutime la kandelojn fajris apud liaj gamboj.

Sur la predikejo staris la predikisto kaj la pilgrimantojn alparolis. Fakte li riproĉegis ilin, ĉar tiel avaraj ili estas, ĉar ĉiu nur prenas kaj neniu donas. Li daŭrigis: «De sankta Antono vi ĉiuj volas sanon, riĉan rikolton, dikajn porkojn, fortan pluvon kaj favoran jaron. Sed neniu donas monon en la kolekto-skatoleteto. Jen mi avertas vin, ke vi pliboniĝu kaj ne estu tiel avaraj, ĉar alimaniere eĉ sankta Antono fuĝos el la preĝejo!»

Fakte la ŝuisto Gaŝper ĉiam pli forte sentis la fajron de la kandeloj ĉe la nudaj gamboj. Tial li aŭdante la vortojn de la predikisto eluzis la okazon kaj fuĝis el la preĝejo. Ekkriis la pilgrimantoj: «Miraklo, jen miraklo», kaj postkuris lin. La ŝuisto Gaŝper deprenis la maldekstran kaj poste dekstran sandalojn kaj ĵetis ilin kontraŭ la pilgrimantoj. Ili tuj ekbatalis por tiuj sandaloj kaj dumtempe la ŝuisto hejmen kuris, ŝanĝis la vestaĵon kaj eklaboris sian laboron.

Butalanoj tiam pripensegis: «Nuna kredo certe estas falsa, se eĉ sankta Antono el la preĝejo fuĝis!»

Kaj ili petis la iaman paroĥestron ke li revenu. Jen tiel al Butale revenis ankaŭ iama kredo kaj same restis iamaj Butalanoj.

BIBLIOTEKA APOGO BACHRICH EKfunkcias


Danke al malavara donaco de la gefiloj de Johano kaj Maria Bachrich, UEA povis denove starigi fondaĵon por subteni la pliriĉigon de la kolektoj de Esperanto-bibliotekoj. Ekde 1997 funkciis Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen, kies kapitalo elĉerpiĝis en 2011. Lastatempe la gefiloj de ges-roj Bachrich donacis al UEA 20.000 USD (ĉ. 14.500 €) kiel kapitalon de la Biblioteka Apogo honore al la Geedzoj Maria kaj Johano Bachrich. La Estraro de UEA akceptis kun granda dankemo la donacon, kiu laŭ la interkonsento kun la gefiloj Bachrich ebligis subvenciojn dum dek jaroj.

Johano (Juan) Bachrich estis eminenta venezuela esperantisto, kiu naskiĝis en 1921 en Vieno kaj lernis Esperanton en 1938 en Zemun (Jugoslavio). Ekde 1948 li vivis en Venezuelo. Li estis longe la motoro de Venezuela Esperanto-Asocio, kiun li reprezentis en la Komitato de UEA ekde 1978 ĝis sia forpaso en 2005. Li estis ankaŭ mecenato de la

Movado, kontribuante i.a. al la realigo de la instruaj videoprojektoj "Mazi en Gondolando" kaj "Esperanto: Pasporto al la tuta mondo". En 2000 li fariĝis Honora Membro de UEA. Lia edzino Maria, ankaŭ esperantisto, naskiĝis en 1936 kaj forpasis en 2011.

Biblioteka Apogo Bachrich disdonos subvenciojn unuafoje ĉi-jare. Ili estas celitaj al Esperanto-bibliotekoj, kiuj ne estas financataj de ŝtata, urba aŭ alia ne-movada instanco. Diference de la iama Apogo Thorsen, kiu subvenciis nur akiron de libroj, la subvencio estas uzebaj ankaŭ por aliaj varoj aĉeteblaj ĉe la Libroservo de UEA.

Por peti subvencion, oni sendu priskribon pri la biblioteko kaj liston de dezirataj libroj aŭ aliaj varoj, ordigitaj laŭ prefero. La petoj atingu la Centran Oficejon de UEA ĝis la 30^a de aŭgusto papere (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando) aŭ retpoŝte (direktoro@co.uea.org).



Laste trovitaj!

El la serio de la esperantistaj karikaturaj, komisiitaj al desegnisto Jean-Robert kaj eldonitaj de s-ino Alice-Leontine Farges, ĉifoje mi prezentas esperantiston ne tre konatan de la vasta publiko, tamen same kiel ĉiuj pioniroj, tre gravan pro lia ligiteco kun pluraj esperantistoj kies semado en la Esperanta kampo estis aparte valora kaj fruktodona. Jen s-ro Jacques Camescasse! En la bildo li estas baktanta kun leteroj, de li ricevitaj probable pro sia UEA-delegiteco.

J. Camescasse naskiĝis junie 1869 en Parizo, kie li mortis en 1941. Profesie li laboris kiel kontisto. Granda idealisto kaj humanisto, sian tutan vivon li dediĉis al la aliaj, kio kaŭzis al li gravajn financajn problemojn. Por li gravis alporti plibonigon de la moraleco, frateco kaj justeco en la homa vivo kaj interhoman egalcon. Sekve li aliĝis al la ideoj de Esperantismo, socialismo kaj framasonismo. J. Camescasse tre ŝatis la francan literaturon kaj matematikon, kaj li konsideris sin kiel pedagogon pri diversaj aferoj: Esperanto, matematiko kaj librotenado. Estis de li kreita nova logika librotenada metodo, kiun - pro financaj kaŭzoj - li ne povis eldoni. Unu el liaj lernantoj elmigris Usonen kaj pli poste tiu metodo reaperis en Francio kiel "amerika metodo"! Surbaze de la verko de C. Laisant "Initiation Mathématique", de li esperantigita, J. Camescasse elpensis sian "Matematika Inicilo"-n, nome didaktikan ludilon, pri kies plensukcesa pedagogia elprovo li ricevis letere raporton de Laisant mem.

Ne konatas la jaro de lia esperantistiĝo, tamen oni scias ke en 1906 li kunfondis kun Alfred Mithey la framasonan Loĝion "Esperanto", kiu en 1913 aliĝis al la Granda Loĝio de Francio. En la 1914^a jaro li aktiviĝis kiel LKK-ano por la okazigo de la 10^a UK en Parizo, kiu bedaŭrinde ne okazis pro la eksplodo de la Mondmilito. Li estis delegito de UEA kaj vigle subtenis la lokan movadon. En januaro 1931 kun loĝianoj J. Camescasse organizis ĉiunlundan tagmanĝon, nomatan "Agapo", kiu fariĝis tradicia kunvenejo de multaj esperantistoj, inter kiuj Jacques



Mahé, liaj edzino Germain Faucher kaj fratino Émilienne, kaj Huguette Royer.

Komence de la dua Mondmilito, la loĝio Esperanto devis disiĝi kaj li kunprenis hejme ĝian arkivon. Nelonge post lia forpaso, la germana Gestapo sin prezentis por lin aresti: ĝi povis forporti nur la tutan arkivon!

Do, vi konatiĝis kun alia grava esperantisto, malmulte konata, sed inter lia amikaro, menciita pli supre, troviĝas la nomo de iu franca esperantisto kiu estis kaj estas ankoraŭ fama en Esperantujo: temas pri Jacques Mahé, pseŭdonime Lorjak.

Kiu li estis?

Jacques Louis Mahé (Parizo, 1912-1992) estis franca esperantisto, reklamfotisto, filmisto kaj verkisto. Li esperantistiĝis en 1932. Profesia fotisto, li estis altirita de filmado kaj fariĝis pioniro de la Esperanta filmo. En 1937 li prezentis sian senparolan Esperanto-propagandan verkon *Antaŭen* (1936) en la internacia konferenco "Esperanto en moderna vivo". *Antaŭen* surekranigas absurdaĵojn okazantajn pro lingva



nescio en fremda lando: rolantoj estas anoj de la tiama pariza grupo. En 1963 li produktis la unuan originale Esperantlingvan longdaŭran fikcian filmon: la unuhoran *Angoroj*. La ĉefrolantoj estis ak-

toroj de la Internacia Arta Teatro (kiu funkciis de 1957 ĝis 1969 sub gvido de Srdjan Flego, el Kroatio). Ĝi konsistis el geaktorj el diversaj landoj. Tiu ĉi prikrima - sed Schwartz-e humura - filmo, kiu okulume aludas al esperantistoj kaj esperantaĵoj, estis aprezata en diversaj kongresoj kaj eldonita sur vidbendo de LF-koop.

Ne nur filmoproduktanto li estis: plurajn romanojn kaj novelarojn li verkis sub la pseŭdonimo *Lorjak*. Ĉi tiuj montras lin ne nur la plej inda heredanto de la Schwartz-aj humuro kaj vortludemo, sed ankaŭ proprastila kreanto de ekscitaj intrigoj kaj amanto de Parizo. Liaj verkistaj kvalitoj kulminas eble en *Regulus*, longa aventur-romano pri la Parizo de la 17^a jarcento.

Por konatiĝi kun lia verkaro, konsilindas konsulti la Bibliotekon de TEA, kie troviĝas ĉiuj liaj libroj. Indas vere ties legado!

Fontoj: EdE; Vikipedio

81a Itala Esperanto-Kongreso, Fai della Paganella, Trento, 23-30 aŭgusto 2014 Vizitu la ttt-paĝon: kongreso.esperanto.it/81/. Kvar kialoj por partopreni en ĝi:

- ★ Ĝi proponas al vi samtempe kaj italan kaj eŭropan kongreson. La partoprenantoj kaj la prezentantoj (artistoj, prelegantoj, gvidantoj de seminarioj, ktp) estis en la lastaj jaroj pli multenombre eksterlandanoj ol italoj.
- ★ Ĝi proponas al vi grandan gamon da kulturaj programeroj, inter kiuj la seminario AMO de UEA, la sola en Okcidenta Eŭropo, gvidota de Stefan MacGill mem. Ĉi tiuj seminarioj, unu en ĉiu mondoparto, estas nuntempe la pinta agado de UEA por pretigado de aktivuloj.
- ★ Ĝi proponas al vi multegajn tuttagajn kaj duontagajn ekskursojn tra la arttrezoroj de la norditalaj urboj kaj tra la naturo de la alpaj montoj kaj lagoj.
- ★ Ĝi proponas al vi serion de koncertoj, teatraĵoj, libroprezentadoj, kiuj en si mem estas aparta kongreso.

PLIOFTAJ PARONIMOJ

Jen aliaj dekoj da paronimoj senditaj de nia laborema Viglo.

Siringo	(Bo) g. (<i>Syringa</i>) de falfoliaj arbustoj (Md) grekdevena prefikso	Spatulo	(Zo) (<i>evi</i>) = kuleranaso (anseroforma birdo)
Sirinkso	(Be) pajnoŝalmo (Zo) voĉorgano de birdoj	Speco	similaĵaro laŭ karakterizaj ecoj; nedifinita persono aŭ objekto
Skabo	(Bo) plantmalsano	Specio	(Bo) (Zo) unuo de botanika k zoologia sistematiko
Skabio	(Md) infekta haŭtmalsano	Speso	internacia konvencia monunuo, elpensita R. de Saussure (1907)
Skabiozo	(Bo) g. (<i>Scabiosa</i>) de herboj el dipsakacoj, kelkaj pororname kaj medicine uzataj	Spezo	(Fi) movo de mono inter malsamaj kasoĵ aŭ kontoj
Skabelo	benketo; malalta seĝeto sen dorsapogilo	Spico	(Ga) aroma vegetaĵa substanco
Skabeno	oficisto helpanta la urbestron	Spiko	(Bo) alcentra infloresko, finevoluanta al infruktesko, de pluraj plantoj (ekz. greno)
Skalo	(Ar) gradaro (Be) (<i>evi</i>) = gamo (Te) linio dividita per egaldistancaj streketoj en aparatoj, mapoj (Te) rilato inter la efektivaj dimensioj de objekto kaj tiuj de desegnaĵo	Ŝpico	(Zo) sp. de longhara ĉambra hundo
Skalaro	(Mt) grando mezurebla per nombro	Spinaco	(Bo) g. (<i>Spinacia</i>) de herboj el kenopodiacoj
Skalpo	(Md) akcidenta forŝiro de krania haŭto (Am) forŝirita kraniahaŭto kiel militotrofeo de amerikaj ruĝhaŭtuloj (Te) tranĉilo, sekcilo	Spinako	(Mr) triangula helpa velo de jaĥto
Skalpelo		Spirito	(Fz) memkonscia substanco male de materio, viviganta korpon; pensanta homoparto; animo (Fz) superhoma senkorpa esto (Be) ĉefa signifo de verko aŭ verkopeco (In) signo en la greka alfabeto (Fz) mensa vigleco kaj kapablo
Skandalo	kolektiva sento de indigno	Sprito	(Fz) malsana animstato, enuo
Skandio	(Ke) elemento -Sc-, tre malofta metalo	Spleno	(Md) plata muskolo de la nuko
Skandiko	(Bo) g. (<i>Scandix</i>) de herboj el apiacoj	Splenio	
Skapo	(Bo) nebrancĉiganta florportanta tigo	Splinto	(Md) lameneto el rigida materialo por kunteni rompitaĵojn ostojn (Te) forfendaĵo, fragmento
Skapolo	(Md) triangula ostoj de la supra dorso	Splito	(Sp) sporta rapidkuro proksime de la alvenpunkto
Skapulario	(Re) monaĥa manteleto (Re) religiaĵo el benita ŝtofo	Sprinto	
Skarlato	(Be) brilega sangoruĝa koloro	Stablo	tablo por metilaboro; subportilo por tabuloj ks
Skarlatino	(Md) kontaĝa infanmalsano	Staplo	konstruaĵo por konservi varojn
Skolo	tuto de la disĉiploj de filozofo, artisto ks aro da adeptoj de la sama doktrino ks	Stadio	(Fz) mezurunuo ĉe helenoj tempoparto en evoluo
Skolio	marĝena klariga noto	Stadiono	(Sp) sportludejo kun sidlokoj por la publiko
Skolopendro	(Zo) g. (<i>Scolopendra</i>) de grandaj miriapodoj	Staĝo	(Te) instrua aŭ trejnada periodo en ofico
Skolopendrio	(Bo) sp. de asplenio (<i>Asplenium skolopendrium</i>) pororname kultivata	Stazo	(Md) malrapidiĝo ĝis halto de sangocirkulado aŭ laktofluo ks en organismo
Skoto	(Fz) ano de la ĉefa gento de Skotlando	Stako	(Bo) amaso de grenpajlo kun fojno ks; amaso de samformaj objektoj
Ŝkoto	(Mr) ŝnuro de velo	Stoko	(Te) varkvanto disponebla en deponejo
Skotero	(Te) speco de motorciklo	Stalo	(Zo) loĝejo por brutoj
Skutilo	(Sp) durada infana veturileto	Ŝtalo	(Te) tre malmola metalo, aloj de fero kun karbono
Socio	(Fz) interrilatoj de homoj loĝantaj sur iu teritorio (Zo) kunigo de samspecaj bestoj	Stato	situacio de afero, de homo(j) ks
Sozio	(Fz) homo pli malpli simila al alia	Ŝtato	(Fz) politika formo de memstara lando; regno
Soni	(Te) estigi aŭdeblan aervibradon, por sciigi ion	Stativo	(Te) vertikala stango fiksita sur piedplato, subporte de aparatoj
Sonori	soni laŭte, daŭre	Statoro	(Te) fiksa parto de elektra maŝino
Sopiri	senti bedaŭron, ekĝemi pro manko; enlasi aeron en la pulmojn k ĝin ellasi	Staturo	(Md) alteco de homa korpo
Spatato	(Ge) lameneca mineralo (Zo) (<i>evi</i>) = spavino (osta tumoroj ĉe la kruro de ĉevalo) (Bo) granda brakteo de spadiko	Statuso	(Ju) leĝa situacio de persono, organizo ks
Ŝpatato	Ilo por kulturi grundon	Statuto	(Ju) fundamenta regularo de institucio
Spatelo	(Te) plata kulereto por miksi aŭ sterni substancojn; = truleto		

Literatura konkurso "Ivo Rotkvić"

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE), konforme al sia laborprogramo, anoncas renovigon de *Literatura konkurso "Ivo Rotkvić"*, lanĉita de la iama *Zagreba Esperanto-Ligo*, kun la celo stimuli ĉiaspecan literaturan kreadon en Esperanto, por malkovri literaturajn talentulojn kaj konigi iliajn verkojn en Esperantujo per premio kaj publikigo en "Zagreba Esperantisto" aŭ libroforme.

UZE anoncis ĉi tiun konkurson okaze de pasintjara *Zamenhofa tago*, kiu dekomence estis opiniata *Tago de Esperanta libro*.

Oni invitas ĉiujn literaturemulojn de Esperantujo partopreni en la jenaj konkursaj branĉoj:

1) **Originala prozo** (inkluzive de teatraĵoj). Maksimuma longo de konkursaĵoj nefiksita, sed preferataj mallongaj prozaĵoj.

2) **Originala poezio**. Maksimuma longo nefiksita, sed preferataj mallongaj poeziaj formoj.

3) **Tradukaĵoj el la kroata**. Maksimuma longo nefiksita, sed preferataj mallongaj prozaĵoj aŭ poeziaĵoj de aŭtoroj mortintaj antaŭ pli ol 70 jaroj aŭ de tiuj, kiuj donis skriban permeson traduki kaj senpage publikigi iliajn verkojn.

3) **Tradukaĵoj el aliaj lingvoj**. Maksimuma longo nefiksita, sed preferataj mallongaj prozaĵoj aŭ poeziaĵoj de aŭtoroj mortintaj antaŭ pli ol 70 jaroj aŭ de tiuj, kiuj donis skriban permeson traduki kaj senpage publikigi iliajn verkojn.

Konkursi povas nur la ĝis nun nepublikigitaj verkoj, aŭ la verkoj kiuj aperis en interreto. Ĉiu konkursaĵo estu aparta *word-* aŭ *pdf-*dokumentoj, subskribita per pseŭdonimo kaj alkroĉita al la retmesaĝo, en kiu estu skribita la vera nomo de la aŭtoro/tradukinto kaj lia/ŝia retadreso. UZE elektos la ĵurion kiu prijuĝos ĉiujn ricevitaĵojn. Laŭreatoj estos premiataj per diplomoj kaj libropremioj.

UZE retenos dum unu jaro la ekskluzivan rajton publikigi ĉiujn premiatajn (kaj nepremiatajn) konkursaĵojn en "Zagreba Esperantisto" aŭ en apartaj libretoj.


Konkursaĵojn oni sendu antaŭ la 31^a de oktobro 2014 rete al zagreba.esperantisto@gmail.com.



Kio en Gresillon?

Sennacieca semajno alternativa antaŭ SAT-kongreso, de vendredo, 1-a ĝis sabato, 9-a de aŭgusto 2014

KURSOJ: *Junĉjo* (Songyun Lee, Koreujo) Korea natura medicino; *Nina Korĵenevskaja* (Rusio) Paroliga kurso; *Luz Vazquez* (Katalunujo) Kuraĝu paroli! (Cseh-metodo). **PRELEGOJ:** *Junĉjo* (Songyun Lee, Koreujo) Prelego pri la Korea natura medicino kaj la Junĉjo-metodo; *Luz Vazquez* (Katalunujo) Helpo kaj saniĝo per spiritaĵoj laŭ la instruo de Bruno Gröning; *Nina Korĵenevskaja* (Rusio) Prelegserio pri rusa pentrarto, surrealismo de Dali, kubismo de Picasso; *Reza Azarhoushang* (Irano) Prelego pri politika situacio kaj kulturo de Irano kun fotoj de vidindaĵoj; kaj aliaj. **AKTIVAĴOJ:** Grupaj ekskursoj posttagmeze al Luar-kasteloj kaj aliaj vidindaĵoj en la regiono; Nina Korĵenevskaja (Rusio) Teatraĵoj kaj skeĉoj por komencantoj kaj spertuloj; kaj multaj aliaj programeroj.



Ne forgesu aŭskulti la radian dissendon en la sube indikitaj tagoj.

E-to ĉe Alirprogramoj de RadioUno je la h. 14.50

Merkrede la 16^{an} de julio: la 7^a Mezorianta Kunveno en Kartvelio.

Lunde la 18^{an} de aŭgusto:

9 minutoj kun ...

Bonan aŭskultadon!


Kvizo de Viglo

Nia amiko Viglo sendis strangan problemon:

Ĉu eblas?

En la bildo klare videblas la du kunmetitaj partoj de ligna kubeto. La aliaj du malantaŭaj flankoj egalas la du videblajn.

Laŭ vi, ĉu la du partoj estis kunmetitaj kaj, do disigeblaj, aŭ ili rezultis el ĉizado de la ligno kaj, sekve, nedisigeblaj?



Cerbumu, cerbumu, miaj karaj, kaj paciencu ĝis la venonta TEA-Bulteno por kontroli, ĉu via respondo ĝustas aŭ ne!

Kompreneble, la redaktanto pretas premii la unuan lertan solvonton.



VIGLO

Mallonge pri:

FESTO ĈE ANITA, dimanĉon la 20^{an} de julio, ekde la 18^a horo.

Priajn informojn petu de Edvige aŭ Elda.

Fermo de la asocia sidejo: julie kaj aŭguste!

Aktiveco en TEA-sidejo ree komenciĝos


vendredon la 5^{an} de septembro, je la 19^a h.

Bonan someran tempon kaj ĝis septembro!

Dimanĉon la 7^{an} de septembro 2014

Festo de Amikeco sur Monto Forno

Sur la Trilanda Pinto - Dreiländer-eck, renkontiĝos laŭtradicie la esperantistaj grupoj el Aŭstrio, Slovenio kaj Italio. Triestanoj kaj italoj, ne maltrafu ĉi okazon pasigi gajan dimanĉon en esperantista kaj internacia etoso. Rendevuo ĉe la simbolo ekde la 12^a horo. Tie Martin Stuppnig bonvenigos nin ĉiujn!



BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com

Sidejo: Via del Coroneo 15 - Trieste - marde 17.30-19; vendrede 19-21

Tel: (+39) 345 2490291 - 040 350093; 339 2226936

Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it

Grupaj ttt-ejoj: www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org

Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio

Poŝtĉekkonto N° 10834349